

幸福

Feliĉo

山口真一 / Yamaguti Sin'iti

生きとし生けるものが幸せでありますように。

Sabbe sattā bhavantu sukhittā

このメッセージは「慈経」という、東南アジアの仏教徒たちに愛誦されている短いお経の中にあります。仏教が大切にする「慈悲」の本質を、きわめて簡潔かつ明瞭に表現しています。ときどき、「東南アジアは小乗仏教で、小乗仏教というのは自分の覚りだけを重視して慈悲の精神に欠けている」という人がいますが、決してそんなことはありません。事実、東南アジアの人たちは概してとても親切です。仏教精神が生活の中で身に備わっているのではないかと思います。（もちろん全員ではありません）

これに対して、東アジアの大乗仏教圏でいう慈悲は、根本的には東南アジア仏教のそれと変らないものの、自分の幸せと他者の幸せを不可分一体のものとしてとらえることに特徴があります。むしろ、他者の幸せが自分の幸せよりも先に來ることさえあります。

**世界がぜんたい幸福にならなければ個人
の幸福はありえない**

Ĉiuj estaĵoj estu feliĉaj.

Sabbe sattā bhavantu sukhittā

Tiu ĉi mesaĝo troviĝas en “la Sutro pri la ĉion ampleksanta amo” (*mettasutta*), kiu estas ŝate recitata de budhanoj en Sudorienta Azio. Ĝi tre klare kaj simple esprimas la esencon de Granda Kompato, grava kerno de budhismo. Fojfoje iuj diras, ke la budhismo en Sudorienta Azio estas hinajana, kaj ĝi celas sole meman vervekiĝon, malhavante la spiriton de Granda Kompato. Sed tio ne veras. Efektive homoj en Sudorienta Azio estas tre afablaj ĝenerale. La spirito de budhismo penetris en ilian vivon, mi pensas. (Kompreneble ne de ĉiuj)

Dume Granda Kompato de la mahajana budhismo en Orienta Azio, kvankam ĝi en la fundamento estas ne malsama kiel tiu de la budhismo en Sudorienta Azio, havas la trajton, ke oni trovas sian feliĉon ne apartigebla de alies feliĉo. Prefere alies feliĉo eĉ antaŭas meman feliĉon.

Se la tuta mondo ne estas feliĉa, ne povas esti individua feliĉo.

これは宮沢賢治が「農民芸術概論綱要」で語っている言葉です。宮沢賢治は法華經の行者でした。またエスペラントの理念に賛同し、いくつかの詩をエスペラントで習作しています。賢治にとってエスペラントは「世界全体の幸福」のための一つの方便であったのでは、と私は推察します。

幸福とはどういうことを具体的にいうのでしょうか。

宗教者はこの問いに対してしばしば、「物質的充足は相対的幸福に過ぎず、物ではなく心の豊かさが大切である」と説くことが多いようです。確かにその通りではありましようが、世界全体を見渡してみると、衣食にもことかく人たちがたくさんいる事実があります。飢餓そして戦争によってもたらされる災禍を目前にして心の豊かさを説くことに何の意味があるのでしょうか。「衣食足りて礼節を知る」といいますが、物質的充足は必要条件なのです。それが満たされていない現実に対して、援助の手を差し伸べること、またそれをもたらしている政治的経済的要因を追究してその除去のために運動することが仏教者としては求められるところでしょう。それが菩薩の精神でもあります。

かくして物質的にある程度の条件が整ったところで、精神的な意味での幸福が求められます。この意味での幸福とは、真実なるものとの出遇いによってもたらされます。

Tiu ĉi frazo estas el "Skizo de la enkonduko al terkulturista arto" de Miyazawa Kenzi. Li estis praktikanto de la Lotusa Sutro; li ankaŭ aprobis la ideon de Esperanto kaj eĉ prove faris kelkajn poeziojn en Esperanto. Por li Esperanto estis rimedo por "la tutmonda feliĉo", mi supozas.

Nu kion konkrete signifas feliĉo?

Pri tiu ĉi demando religianoj ofte predikas, "Materia sufiĉo estas nur relativa feliĉo kaj ne pli. Grava estas riĉeco de koro, ne de materio." Certe jes. Sed se ni rigardas la tutan mondon, al ni venas la fakto ke tie troviĝas multaj, al kiuj mankas vestaĵoj kaj manĝaĵoj. Antaŭ malsato kaj katastrofo pro milito, kian signifon havas la prediko por riĉeco de koro? Oni diras, "sufiĉa vivrimedo - deca vivmaniero." Materia sufiĉo estas necesa kondiĉo, sed ekzistas la realo de materia malsufiĉo. Ni devas etendi la manon por helpi suferantojn kontraŭ tiu ĉi realo kaj movadi por serĉi kaj elimini la politikajn ekonomiajn faktorojn kaŭzantajn malsufiĉon. Tio estas devo de budhano. Tio estas spirito de bodhisatvo.

Tiel, se materiaj kondiĉoj certgrade kontentiĝas, venas la vico de feliĉo laŭ la senco de spirito. Tiusence feliĉo povas esti alportita pere de renkontiĝo kun vero

損か得か人間のものさし、うそかまことか仏様のものさし (相田みつを)

損得のものさしは私たちがすべて持っているものでしょう。常に計算がはたっています。数量化がはかられません。偏差値、GDP、生涯賃金、目標達成率...すべて数字の世界です。それがいけないというわけではありません。世俗の世界に生きる上で損得のものさしをもたないわけにはいきません。ライオンに「殺生は悪いからやめなさい」と言えないのと同じです。

しかし損得のものさしだけで生きる、生涯を終わることは空しいことではないでしょうか。真実との出遇いといっても、何が真実なのか分からない...これについて私は一つだけ言いたいのです。それは、すべての人を人として尊敬する、ということです。法華経に常不軽菩薩が登場します。人々に対して、「あなた方はきっと仏に成るべきお方だから、私は深くあなた方を敬います」と、馬鹿にされても罵られても人々を敬い続けた菩薩です。これはかなり難しいことです。私たちはどうしても誰かしらと対立し、自分を正当化したがります。

まずは一人と一人との関係から出発しましょう。しかるのちに民族と民族、国と国との関係へと進んでいきましょう。エスペラントはそのために良い条件を提供してくれるはずです。

Ĉu utila aŭ malutila estas la homa mezurilo; ĉu vera aŭ malvera estas la budha mezurilo. (Aida Mituo)

Ni ĉiuj havas la mezurilon de utila-malutila. Ĉiam kalkulado, ĉiam nombrado. Devivaloro, MEP (Malneta enlanda Produkto), dumviva salajro, proporcio de atingita sumo al la celo, k.t.p. Mi ne diras, ke tiuj ĉi estas malbonaj. Dum ni vivas en laika mondo, ni ne povas malhavi la mezurilon de utila-malutila. Tiel same, kiel oni ne povas malpermesi al leonoj mortigi, dirante ke tio estas malbona.

Sed ĉu ne estas vante vivi nur kun la mezurilo de utila-malutila ĝis la lasta momento? Temante pri renkontiĝo kun vero, ni tamen ne scias, kio estas vero... Rilate al tio ĉi mi volas diri nur unu punkton. Tio estas respekti ĉiujn homojn kiel homon. En la Lotusa Sutro aperas la bodhisatvo nomata Sadāparibhūta, kiu ĉiam al homoj diradis spite ĉiajn mokojn kaj insultojn: "Vi certe fariĝos budho, tial mi profunde respektas vin." Lia konduto estas tre malfacila por ni. Ni ĉiam emas kontraŭstari kun iuj aliaj kaj opiini ke ĝusteco estas ĉe ni.

Ni komencu unue de la rilato de unu kun la alia individuo, kaj plue antaŭeniru al la rilato de unu kun la alia nacio, la alia ŝtato. Esperanto certe prezentos bonajn kondiĉojn por tio.